

Juillet-août  
Julio-aŭgusto  
2011

# Esperanto la verda stelo

94

ASSOCIATION  
ESPÉRANTISTE  
Dumonata revueto  
numero 68

[esperanto94.info](http://esperanto94.info)

KALENDARO

## DEVOIRS DE VACANCES

### SOMERAJ TASKOJ

*C'est l'été, les vacances, le soleil brille, vous paressez allongé(e) à l'ombre, mais vous avez décidé d'entraîner tout de même vos neurones !*

**Estas somere, vi libertempas, brilas la suno, vi pigre kuŝas sub ombro, sed vi tamen decidis laborigi viajn neŭronojn !**

**VOICI LA SOLUTION !**

**JEN LA SOLVO !**

*Nous vous proposons un petit voyage à travers l'ESPERANTO*




**Ni proponas al vi vojaĝeton tra  
ESPERANTO**



*Fêtes des associations  
Ormesson samedi 10/9/2011  
Choisy-le-Roi 10 et 11/9/2011*

*Parlez-en autour de vous  
Une bonne occasion de  
s'informer  
Nous vous attendons.*

*Découvrez un peu l'Espéranto  
p. 2, 3, 4, 5, 8  
Bonnes vacances*



*Bonan libertempon*

**Signez la pétition !**

*(voir en page 4)*



<http://esperanto-au-bac.fr>

## REVUE BILINGUE : ESPERANTO – FRANCAIS

<p>p. 2 Foire internationale « Tourisme et Culture ».</p> <p>p. 3 Film chinois en espéranto. Séminaire à Kinshasa.</p> <p>p. 4 Le monde sur Internet ; Espéranto au baccalauréat.</p> <p>p. 5 Timbre sur l'Espéranto . Succès de la rencontre à Sète.</p> <p>p. 6 Concours des 100 000 utilisateurs de « <i>lernu !</i> »</p> <p>p. 7 Cours pour enseignants. L'espéranto en Chine.</p> <p>p. 8 Notre président d'honneur. Tour de Babel de livres.</p>	<p>p. 2 Internacia Studumo « Turismo kaj Kulturo ».</p> <p>p. 3 Ĉina filmo en esperanto. Seminario en Kinŝaso.</p> <p>p. 4 La mondo ĉe la reto ; Esperanto ĉe bakalaŭreco.</p> <p>p. 5 Poŝtmarko pri Esperanto. Sukcesa renkontiĝo en Sète.</p> <p>p. 6 Konkurso de la 100 000 uzantoj de « <i>lernu !</i> ».</p> <p>p. 7 Kursoj por instruistoj. Esperanto en Ĉinio.</p> <p>p. 8 Nia honorprezidanto. Libra Babelturo.</p>
Imprimerie Spéciale	
<p>Poŝtadreso : LA VERDA STELO – ESPERANTO 94 3 Rue Pablo Picasso Appartement 507 94600 Choisy le Roi Francio / France</p>	<p>Prezidanto : Tereza Sabatier : terezasa@club-internet.fr Sekretariino : Sylviane Lafargue Redaktorino : Tereza (☎01.45.76.10.57) Kasisto : christianvacheron @free.fr Korektanto : Vito Sendanto : Oktavio</p>

### La Anoncetoj

ETUDE INTERNATIONALE « TOURISME ET CULTURE »	INTERNACIA STUDUMO “TURISMO KAJ KULTURO”
<p>Etudier le tourisme et la culture » au Centre International (ISTK) à Bydgoszcz (Pologne) – L'Académie Culturelle Internationale des Sciences (AIS) devient de plus en plus populaire dans les diverses parties du monde (sont déjà venus des étudiants de plus de 90 pays). D'où la création de notre nouveau site <a href="http://www.esperanto-studium.za.pl">www.esperanto-studium.za.pl</a>, où vous pouvez choisir les informations sur ISTK dans la langue de votre choix (déjà 7 langues sont proposées : en esperanto, polonais anglais, français, allemand, letton et russe).</p> <p>Donc, jusqu'au 30.06.2011 on peut s'inscrire pour l'année à ISTK (15.08.2011 - 6.05.2012) en payant 300 €/€ pour l'année. Dès juillet le tarif sera de 350 €/€ et 400 €/€ après le 31/07/2011.</p> <p>Etant à Bydgoszcz on peut en même temps étudier à l'Académie Internationale des Sciences (AIS) – cotisation 32,50 €/€ pour 3 ans, pour obtenir en plus du diplôme de ISTK un baccalauréat ou une licence d'AIS.</p>	<p>Studado en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bidgoŝĉo (Pollando) – Klerigejo de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) fariĝas pli kaj pli populara en diversaj partoj de la mondo (venis jam studentoj el pli ol 90 landoj). Tial aperis nia nova retpaĝo: <a href="http://www.esperanto-studium.za.pl">www.esperanto-studium.za.pl</a>, kie vi povas elekti nomon de la Studumo en elektita lingvo en kiu vi volas legi niajn ISTK – informilojn jam en sep lingvoj : Esperanto, pola, angla, franca, germana, litova kaj rusa. Do : ĝis la 30.06.2011 eblas aliĝi por la ISTK-studjaro de 15.09.2011 – 6.05.2012 pagante 300 €/€ por la tuta studjaro 2011/2012. Ekde julio la ISTK – studadkotizo altiĝas 350 €/€ ĝis la 31.07.2011 kaj poste 400 €/€.</p> <p>Veninte al Bidgoŝĉo oni povas samtempe ekstudii ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) – kotizo trijara 32,50 €/€, kio ebligas akiron krom polan ISTK – diplomon ankaŭ diplomojn de bakalaŭro kaj magistro de AIS.</p>
<p><b>Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo str. M.Sklodowskiej-Curie 10, tel/fakso: 48-52 346 11 51, rete: stud@esperanto.bydgoszcz.eu aŭ andreo@rubikon.net.pl PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando</b></p>	

#### UN COURS SUR INTERNET : POUR DECOUVRIR L'ESPERANTO en 10 leçons

<http://ikurso.esperanto-jeunes.org/aligxi.php>

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Un contrôleur chez un paysan cherche des cultures interdites Le paysan dit : <b>N'allez tout de même pas dans ce champ.</b> Le contrôleur montre son autorisation : <b>- Je peux aller partout !</b> <b>- Bien ! faites !</b> répond le paysan. Un moment après, le contrôleur, courant devant un taureau furieux, hurle « <b>A l'aide !</b> ». <b>- Le paysan lui crie : Montrez-lui votre autorisation !</b></p>	<p>Kontrolisto ĉe kamparano serĉas nepermesitan kulturajn. - La kamparano diras : - <b>ne iru tamen tiun kampon.</b> La kontrolisto montras sian rajtigilon : <b>- mi rajtas iri ĉien !</b> <b>- Do faru,</b> respondas la kamparano. Momenton poste la kontrolisto kurante antaŭ furioza virbovo hurlas « <b>helpon !</b> »-- <b>- Montru al ĝi vian rajtigilon !</b> krias la kamparano.</p>
	

PREMIER FILM CHINOIS SOUS-TITRÉ EN ESPERANTO	UNUA ĈINA FILMO SUBTITOLITA EN ESPERANTO
<p>Récemment à Tajwan a paru un long métrage (durée 96 mn.) avec sous-titrages en espéranto. C'est un documentaire présenté sur les écrans de grands cinémas pendant plusieurs semaines l'hiver dernier. Son metteur en scène Mme Hsueh Chang-hui, est très enthousiaste à propos de l'espéranto et a exprimé le désir de l'apprendre et même de faire un film sur l'espéranto et son histoire à Taiwan.</p> <p>Le titre du film est « L'époque E. SHA » et raconte l'histoire d'une très populaire troupe de chanteurs et de danseurs de 52 artistes femmes (inspirée du groupe japonais Takarazuka), qui voyageait même à l'étranger pour présenter des spectacles musicaux. Puis, ils durent cesser pour des raisons politiques et économiques. Après des dizaines d'années ils essaient de retrouver la gloire passée, la mémoire et d'enseigner leur art à de jeunes artistes. Le film contient beaucoup de chants, de danses et d'informations sur leur histoire. Les spectateurs apprennent ainsi beaucoup sur l'histoire de Taiwan.</p> <p>On peut voir une partie du film sur Youtube à <a href="http://www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8">http://www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8</a></p> <p>Et on peut voir la couverture de la « Feuille de Formose », gazette du groupe esperanto de Taiwan, dont la couverture du dernier numéro est dédiée à ce film à <a href="http://kheirkhah.tripod.com/ff13.html">http://kheirkhah.tripod.com/ff13.html</a></p>	<p>Laste en Tajvano aperis la unua longa filmo (tempo-daŭro: 96 mn) kun Esperantaj subtekstoj. La filmo estas dokumenta kaj ĝi estis sur ekranoj de grandaj kinejoj dum semajnoj en la pasinta vintro. Ĝia reĝisoro, S-ino Hsueh Chang-hui, estas tre entuziasma pri Esperanto kaj esprimas deziron lerni ĝin kaj iam fari filmon pri Esperanto kaj ĝia historio en Tajvano.</p> <p>La filmo nomata « E.SHA Epoko » rakontas la historion de tre populara kant- kaj danc-trupo kun 52 membroj ĉiuj virinoj (inspirita de Takarazuka grupo en Japanio), kiu eĉ vojaĝis eksterlanden por prezentado de siaj muzikaloj. Poste pro politikaj kaj ekonomiaj kialoj la grupo devis ĉesi sian agadon. Post dekoj da jaroj ili revenas por serĉi sian iaman gloron, memoron kaj por instrui junajn artistojn pri sia arto. La filmo enhavas amason da kantoj kaj dancoj kun multaj rakontoj pri ilia pasinteco kaj samtempe spektantoj lernas multe pri la historieto de Tajvano. (De Reza Kheirkhah)</p> <p><i>Oni povas vidi parton de la filmo sur Youtube ĉi tie: <a href="http://www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8">http://www.youtube.com/watch?v=CqLed_pL_q8</a></i></p> <p><i>Kaj ĉi tie oni povas vidi la kovrilon de « Formosa Folio », gazeto de Tajvana Esperanto-Movado, kies kovrilo de la lasta numero estas dediĉita al tiu filmo: <a href="http://kheirkhah.tripod.com/ff13.html">http://kheirkhah.tripod.com/ff13.html</a></i></p>
<p><b>SEMINAIRE A KINSHASA</b></p>	<p><b>SEMINARIO EN KINŜASO</b></p>
<p>Le 23 avril 2011 après-midi s'est terminé le séminaire d'Espéranto qui a eu lieu à Kinshasa et auquel ont participé Andrea Bertrand (France) et Alain Delmotte (Belgique), comme conférenciers et enseignants.</p> <p>64 personnes y ont participé : 44 débutants et 20 en perfectionnement (la plupart enseignant l'espéranto)</p>	<p>La 23-an de aprilo 2011 posttagmeze fermiĝis la E-seminario okaziĝinta en Kinŝaso kaj kiun partoprenis Andrea Bertrand (el Francio) kaj Alain Delmotte (el Belgio), kiel konferencistoj kaj instruistoj .</p> <p>64 personoj partoprenis : 44 gekomencantoj kaj 20 geprogresantoj (plejparte e-instruantoj).</p>





**Conjuguer en espéranto : les terminaisons ne varient pas avec les personnes :**

**Présent -AS ; Passé -IS ; Futur -OS ; Conditionnel -US ; Volitif (impératif/subjonctif) -U ; Infinitif -I**

exemple : Mi kantas ; Vi kantas ; Li-Ŝi kantas ; Ni kantas ; Vi kantas ; Ili kantas : au présent

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Un petit ange décidé vole rapidement vers le Nord et croise un autre ange, qui lui dit surpris :</p> <p>- Tu quittes la côte d'Azur ?</p> <p>- Oui, c'est trop fatigant. Il n'y a pas un seul nuage pour s'asseoir !</p>	<p>Anĝeleto rapide kaj decide flugas norden, li renkontas alian anĝelon, kiu surprize diras :</p> <p>- Vi forlasas lazuran marbordon ?</p> <p>- Jes, estas tro lacige. Estas neniu nuboj por sidiĝi !</p>





<b>LE MONDE, SUR INTERNET</b>	
<p><b>Afrique</b>                      Afrique du Sud : <a href="http://www.esperanto.za.org">www.esperanto.za.org</a>  <b>Amérique</b>                      Argentine : <a href="http://www.esperanto.org.ar">www.esperanto.org.ar</a>                      Brésil : <a href="http://www.esperanto.org.br">www.esperanto.org.br</a>                      Canada : <a href="http://www.esperanto.ca">www.esperanto.ca</a>                      Chili : <a href="http://www.esperanto.cl">www.esperanto.cl</a>                      Uruguay : <a href="http://www.esperanto.org.uy">www.esperanto.org.uy</a>                      USA : <a href="http://www.esperanto-usa.org">www.esperanto-usa.org</a>                      Asie Chine : <a href="http://www.china.org.cn">www.china.org.cn</a>                      Corée : <a href="http://www.esperanto-radio.net">www.esperanto-radio.net</a>                      Japon : <a href="http://www.esperanto.or.jp">www.esperanto.or.jp</a>  <b>Océanie</b>                      Australie : <a href="http://www.esperanto.org.au">www.esperanto.org.au</a>  <b>Europe</b>                      Allemagne : <a href="http://www.esperanto.de">www.esperanto.de</a></p>	<p><b>Europe</b> (suite)                      Autriche : <a href="http://www.esperanto.at">www.esperanto.at</a>                      Belgique : <a href="http://www.esperanto.be">www.esperanto.be</a>                      Espagne : <a href="http://www.esperanto-es.net">www.esperanto-es.net</a>                      Finlande : <a href="http://www.esperanto.fi">www.esperanto.fi</a>                      France : <a href="http://www.esperanto-france.org">www.esperanto-france.org</a>                      GB : <a href="http://www.esperanto.org/uk">www.esperanto.org/uk</a>                      Grèce : <a href="http://www.esperanto.gr">www.esperanto.gr</a>                      Hongrie : <a href="http://www.esperanto.hu">www.esperanto.hu</a>                      Italie : <a href="http://www.esperanto.it">www.esperanto.it</a>                      Norvège : <a href="http://www.esperanto.no">www.esperanto.no</a>                      Pays-Bas : <a href="http://www.esperanto-info.nl">www.esperanto-info.nl</a>                      Pologne : <a href="http://www.esperanto.pl">www.esperanto.pl</a>                      Russie : <a href="http://www.rejm.euro.ru">www.rejm.euro.ru</a>                      Suède : <a href="http://www.esperanto.se">www.esperanto.se</a>                      Suisse : <a href="http://www.esperanto.ch">www.esperanto.ch</a></p>
 	
<p><b>Dans la langue du pays, traduisible dans votre langue nationale</b></p>	

<b>L'ESPÉRANTO AU BACCALAURÉAT</b>	<b>ESPERANTO EN ABITURIENTECO</b>
<p>Une campagne de pétition pour l'espéranto au baccalauréat a été lancée à Sète à l'occasion de la Rencontre Internationale Méditerranéenne d'Espéranto (IREM — 22-26 avril 2011). Il s'agit du fruit d'une collaboration entre les associations Espéranto France et SAT-Amikaro.</p> <p>De nombreuses personnalités du monde scientifique, artistique, sportif et religieux, politique ont accepté que leur nom soit visible dans la liste des signataires (5837 signatures en tout au 27 juin 2011). Le professeur Albert Jacquard, généticien, essayiste et humaniste, a accepté le parrainage de cette campagne.</p> <p>Il est souhaitable que cette démarche stimule de semblables initiatives dans le monde entier et contribue au soutien des démarches qui ont lieu maintenant au Brésil pour le projet de loi de l'espéranto au Brésil).</p> <p>La quantité de documents imprimée pour la circonstance n'a pas suffi : 10 000 journaux, 50 000 tracts et 2500 affiches.</p> <p>Pour la diffusion de cette campagne, il est nécessaire que chacun s'efforce de relayer sa diffusion non seulement à des familiers, collègues ou autres personnes connues, mais aussi à des élus : députés, sénateurs, maires, à des personnalités de divers milieux : artistique, scientifique, philosophique, religieux, politique, sportif, associatif, industriel, commercial (par ex. des Chambres de Commerce, etc.)..(selon H. Masson)</p>	<p>Peticikampanjo por Esperanto en abiturienteco estis lanĉita en Seto okaze de la Internacia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM — 22-26 de aprilo 2011). Temas pri frukto el kunlaboro inter la asocioj Esperanto France kaj SAT-Amikaro.</p> <p>Jam multaj famuloj el la mondo sciencista, artista, sportista, religia, politika, akceptis, ke ilia nomo estu videbla en la listo de subskribintoj (5837 subskriboj entute en la 27a de junio 2011). La patronecon de tiu kampanjo akceptis la profesoro Albert Jacquard, genetikisto, eseisto, humanisto.</p> <p>Estas dezirinde, ke tiu kolopodo stimulu samajn iniciatojn en la tuta mondo kaj kontribuu al subteno al klopodoj okazantaj nun en Brazilo por la Leĝoprojekto de Esperanto.</p> <p>Ne sufiĉis la kvanto da presita dokumentaro por la cirkonstanco : 10 000 ĵurnaloj, 50 000 flugfolioj kaj 2500 afiŝoj.</p> <p>Por la diskonigo de tiu kampanjo necesas ke ĉiu klopodu por plue diskonigi ĝin, ne nur al familianoj, kolegoj aŭ aliaj konatoj, sed ankaŭ al elektitoj : deputitoj, senatanoj, urbestroj, al famaj personoj el diversaj medioj : arta, scienca, filozofia, religia, politika, sporta, asocia, industria, komerca (ekz. Komercaj Ĉambroj, ktp)...</p> <p style="text-align: right;">(laŭ H. Masson)</p>
<p style="border: 1px solid black; padding: 5px;">Site spécial consacré à cette campagne :                      Speciala retejo estas dediĉita al tiu kampanjo :                      Campagne pour l'espéranto au bac — <a href="http://esperanto-au-bac.fr/">http://esperanto-au-bac.fr/</a>  <i>Documents téléchargeables * Elŝuteblaj dokumentoj :</i>                      - <i>Affiche PDF * afiŝo PDF</i> "L'espéranto au bac ?", 50x70cm (66,9 Mo)  <a href="http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/affiche.pdf">http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/affiche.pdf</a>                      - <i>Journal de quatre pages * 4-paĝa ĵurnalo</i>  <a href="http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/journal.pdf">http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/journal.pdf</a>                      - <i>Tract A5 * flugfolio A5</i>                      - <i>Feuille de pétition A4 * peticifolio A4</i>  <a href="http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/feuille.pdf">http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/feuille.pdf</a></p>	

**En espéranto, toutes les lettres se prononcent : un son, une lettre ; une lettre, un son**



TIMBRE POUR FAIRE CONNAÎTRE L'ESPÉRANTO.	POŝMARKOJ POR KONATIGI ESPERANTON
<p>Tel est le but de cette action de la Fédération Espéranto Rhône Alpes. Une enquête d'Espéranto France montre que la moitié des français n'ont jamais entendu parler de l'espéranto. Un timbre passe devant de nombreuses paires d'yeux et permet de rendre visible l'espéranto. Le texte « d'Espéranto-Vive » (Chambéry), est clair et concis. Le mot « espéranto » multicolore avec l'arc en ciel symbolise la diversité et souligne que l'espéranto permet de rejoindre l'autre, de connaître sa culture. La langue, non hégémonique mais équitable, permet un échange où aucun des locuteurs ne domine l'autre. Ses couleurs sont celles du drapeau de la paix. L'utiliser sur tous vos envois est un geste militant puisque le timbre revient plus cher que l'envoi normal 0,83 € (frais de la poste et de maquette, au lieu de 0,60 € dès le 1er juillet 2011. La fédération ne prend pas de bénéfice.</p>	<p>Jen la celo de tiu agado de la Esperanto-Federacio Rodano-Alpo. Demandaro de Esperanto-Francio montras ke la duono de la Francoj neniam aŭdis paroli pri esperanto. Poŝtmarko pasas antaŭ multaj okulparoj kaj ebligas vidigi esperanton. La teksto de « Esperanto-Vivu » (Ĉamberio) estas klara kaj konciza. La vorto « esperanto » bunta kun ĉielarko simbolas la diversecon kaj substrekas ke esperanto ebligas kuniĝi kun alia, koni ĝian kulturon. La lingvo ne hegemonia sed egalrajta, ebligas interŝanĝon kie neniu parolanto superas la alian. Ĝiaj koloroj estas tiuj de la standardo de paco. Uzi ĝin sur tiuj viaj sendaĵoj estas aktivula gesto, ĉar la poŝtmarko kostas iom pli ol normala kosto 0,83 (poŝta prezo kaj por la skizo anstataŭ 0,60€ ekde la 1a de julio 2011). La federacio ne ricevas profiton.</p>
<p>1 planche 27€ 2 planches 52€ 3 planches 77,40€ 4 planches 102,40€ 5 planches 127,40€ 6 planches 153,30€ 5 planches + 25€ par planche en + (maxi 15) frais d'envoi : 3,30€</p>	<p>Commandes : Mireille Besset, Les Pinates, 450 Chemin des Cavaliers, 26260 CHARMES SUR L'HERBASSE, mirev.besset@orange.fr</p>
	

SUCCES DE LA RENCONTRE ESPERANTO	SUKCESA ESPERANTO-RENKONTIĜO
<p>Le 66e congrès de SAT-Amikaro s'est déroulé du 22 au 26 avril 2011 à Sète à l'occasion d'une grande rencontre espérantiste inter associative à l'initiative de la Fédération Espérantiste du Languedoc-Roussillon.</p> <p>Voir le site officiel de la rencontre :</p> <p><a href="http://esperantosete2011.fr">http://esperantosete2011.fr</a></p> <p>Au programme les participants ont pu suivre de nombreux débats et conférences sur divers thèmes.</p> <p><u>Chemins de fer</u> : La signalisation internationale, L'évolution de la SNCF.,</p> <p><u>Forum sur la langue occitane</u> : «L'occitan, une langue honteuse ? Traditions sétoises, débats :</p>	<p>Le Languedoc de la protohistoire jusqu'à nos jours</p> <p><u>Politique</u> : Aide aux migrants en France avec l'espéranto, Solidarité avec la Bosnie par l'espéranto, EDE (Europe-Démocratie-<u>Espéranto</u>).<u>Langue</u> : Que sont les examens CERCL? L'espéranto est-il une langue facile? Table ronde: jeu littéraire, Jules Verne et l'espéranto, L'humour chez Lorjak et Beaucaire</p> <p><u>Internet</u> : E@I: Éducation sur Internet, Groupe de travail sur Wikipedia,</p> <p><u>Horizons lointains</u> : Tourisme solidaire en Amérique centrale: culture et calendrier maya, Connaissez-vous le Népal?, Théâtre d'images Sanpei Keiko, Cuba au 21ème siècle: rêves et réalité.</p>

**Tous les substantifs se terminent en O, *tablo, besto, homo, suno, pluvo...***  
**les adjectifs en A, *bela, ĝentila, granda, logika, malfacila...***  
**les adverbes en E, *rapide, ruĝe, agrable, oficiale, normale...***

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Deux petites chiennes discutent sur le trottoir. Apparaît au coin de la rue un beau chien. L'une des chiennes s'assied brusquement. L'autre surprise lui demande : « Pourquoi t'assieds-tu ? - Ma chère, tu ne peux pas imaginer comme il a le nez froid !</p>	<p>Du hundinetoj interparolas ĉe la trotuaro. Aperas ĉe la stratangulo belega hundo. Tuj iu el la hundinetoj rapide sidiĝas. La dua surprize petas ŝin « kial vi sidiĝas ? - Mia kara, vi ne povas imagi, kiom ĝi havas malvarmegan nazon !</p>
	

CONCOURS DES 100 000 UTILISATEURS DE "LERNU"	KONKURSO POR LA 100 000 UZANTOJ DE "LERNU"
<p>Depuis plus de 8 ans d'existence, "<b>lernu!</b>" a crû d'un petit site modeste à un grand portail, traduit en plus de 30 langues. Et maintenant c'est depuis longtemps le site le plus important pour apprendre l'espéranto. Mais "<b>lernu!</b>" n'est pas seulement un grand ensemble de pages web, c'est aussi une communauté avec plus de 150 000 personnes qui chaque mois visitent quelques millions de pages et plusieurs centaines de bénévoles : traducteurs, aides linguistiques, éditeurs des dictionnaires, programmeurs et dessinateurs, qui tous les jours travaillent pour que le site reste vivant et fonctionne. Et maintenant nous pouvons annoncer que "<b>lernu!</b>" est aussi une communauté avec <b>100 000 utilisateurs enregistrés</b> ! Vous aussi, faites partie de cette communauté, lorsque vous le visitez..</p> <p>À l'occasion de cet événement important, "<b>lernu!</b>" organise un grand concours avec des prix de valeur :</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Ordinateur portable Acer Aspire (Intel Dual core P6100 (2,0 Ghz), RAM 4Go, disque dur 320 Go, écran 15 pouces, Windows 7 Home Premium) ;</li> <li>• Ordinateur netbook mini (Intel Atom N270 Mobile CPU (1,6 GHz), 1 Go RAM, disque dur 160 Go, écran 10 pouces, Windows XP Home).</li> </ul> <p><b>Comment participer au concours ?</b></p> <p>Créez une publicité amusante et intéressante à propos de "<b>lernu!</b>". Cela peut être un film court (jusqu'à 5 minutes), une belle photo ou un dessin. La meilleure des soumissions sera ensuite utilisée pour faire la publicité de "<b>lernu!</b>". Car nous aimerions utiliser votre publicité à destination d'un public non espérantiste. Il devrait de préférence être dans une langue nationale avec traduction en espéranto (ou elle peut être en espéranto avec des sous-titres en langue nationale). Le résultat devra être disponible sur Internet (vous pouvez héberger votre publicité sur les sites suivants : Facebook, flickr, YouTube, etc). Envoyez le lien vers votre travail par courriel à <a href="mailto:konkurso@lernu.net">konkurso@lernu.net</a>.</p> <p>Le concours durera <b>jusqu'au 31 juillet 2011</b>. À la fin, nous organiserons un vote sur <b>lernu!</b>. Un gagnant sera élu par les utilisateurs du site et un autre par l'équipe de <b>lernu!</b>. Nous vous invitons tous à participer au concours.</p>	<p>De pli ol 8 jaroj da ekzistado, "<b>lernu!</b>" kreskiĝis de modesta malgranda paĝaro al pordego, tradukita en pli ol 30 lingvoj. Nun, ĝi estas jam delonge la plej potenca paĝaro por lerni esperanton. Sed "<b>lernu!</b>" estas ne nur granda aro da retaj paĝoj, sed ankaŭ komunumo el pli ol 150 000 vizitantoj, kiuj vizitas ĉiun monaton kelkajn milionojn da paĝoj kaj pluraj centoj de bonvoluloj, tradukantoj, lingvaj helpantoj, eldonanto de vortaro programistoj kaj desegnistoj, kiuj ĉiun tagon laboras por ke la paĝaro restu vivanta kaj funkcia. Kaj, nun ni povas anonci ke "<b>lernu!</b>" ankaŭ estas komunumo kun <b>100 000 da uzantoj</b> registritaj ! Vi ankaŭ estas en tiu komunumo kiam vi vizitas ĝin</p> <p>Okaze de tiu grava evento, "<b>lernu!</b>" organizas grandan konkurson kun valoraj premioj.</p> <ul style="list-style-type: none"> <li>• Portabla komputoro Acer Aspire (Intel Dual core P6100 (2,0 Ghz), RAM 4Go, malmola disko 320 Go, ekrano 15 coloj, Windows 7 Home Premium) ;</li> <li>• Komputoro netbook mini (Intel Atom N270 Mobile CPU (1,6 GHz), 1 Go RAM, malmola disko 160 Go, ekrano 10 coloj, Windows XP Home).</li> </ul> <p><b>Kiel partopreni tiun konkurson ?</b></p> <p>Kreu amuzan kaj interesan reklamon pri "<b>lernu!</b>". Tio povas esti mallonga filmo (ĝis 5 minutoj), bela foto aŭ desegno. La plej bona el la proponoj estos poste uzita por propagandi pri "<b>lernu!</b>". Ĉar ni ŝatus uzi vian reklamon al ne esperantistoj, ĝi prefereble estos en nacia lingvo kun traduko en esperanto (aŭ ĝi povas esti en esperanto kaj subtitolita en nacian lingvon). La rezulto devas esti disponebla en la reto (prie, vi povas uzi plurajn servejojn kiel : Facebook, flickr, YouTube, ktp). Sendu la ligilon al via laboro pere de mesaĝo al <a href="mailto:konkurso@lernu.net">konkurso@lernu.net</a>.</p> <p>La konkurso daŭros ĝis la 31a de julio 2011. Je la fino, ni organizos voĉdonon en "<b>lernu!</b>". Gajnanto estos elektita de la paĝaruzantoj kaj alia de la "<b>lernu!</b>"-skipo. Ni invitas vin ĉiujn partopreni la konkurson</p>



RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Un ophthalmologue met en garde son patient.                      - J'ai l'impression que vous buvez beaucoup.                      - Ma foi... oui !                      - Savez-vous que l'alcool est très mauvais pour votre vue ?                      - Vous voulez rire ! Moi, quand je bois, je vois double !</p>	<p>Oftalmologo atentigas sian pacienton :                      - Mi havas la impreson ke vi multe drinkas !                      - Certe... jes !                      - Ĉu vi scias ke alkoholo tute malbonas por via vido ?                      - Ĉu vi ŝercas ? Kiam mi drinkas mi vidas ĉion double !</p>



LES COURS CHEZ « RITE » ONT RECOMMENCE	KOMENCIĜIS LA STUDIOJ ĈE "RITE"
<p>Nous vous informons qu'après un an de création, nous avons <b>lancé en avril sur edukado.net (RITE)</b> par Internet, un entraînement à l'enseignement guidé par Katalin Kováts. Ce cours moderne sur le Net a été fait en collaboration avec différentes organisations espérantistes et certains spécialistes éminents. RITE a pour but le perfectionnement à l'enseignement et l'éducation, à la culture et sur le mouvement, Il est aussi destiné aux collègues, qui peuvent difficilement ou pas du tout participer à des cours ou rencontres sur place. Le cours a déjà une dizaine d'inscrits, dont 5 collègues (de Belgique, Grèce, Nouvelle Calédonie, Australie et Vietnam) qui ont commencé l'étude.</p> <p>Le programme contient un cours de 100 leçons avec thèmes : méthode, grammaire, littérature, histoire du mouvement, phraséologie et thèmes au choix. La formation se fait par Internet. Chaque étudiant, à son propre rythme, charge les leçons suivant une progression linéaire des thèmes en parallèle. Un test permet d'accéder à la leçon suivante du thème. Des exercices pratiques guidés sont inclus aux 30 parties de la méthode. L'entraînement se déroule selon les besoins des candidats.</p> <p>Les cours ne sont pas gratuits, mais il existe diverses manières pour en faciliter l'accès.</p> <p><b>Condition pour suivre RITE :</b> avoir au minimum un niveau B2 de connaissance de l'espéranto et un accès à Internet. Les candidats après s'être inscrits passent une interview avant de commencer, pour les aider à élaborer leur programme d'étude personnel.</p>	<p>Ni informas vin ke post unujara konstruado en aprilo <b>ni lanĉis la Retan Instruistan Trejnadon ĉe edukado.net (RITE)</b> gvidatan de Katalin Kováts. La moderna reta kursaro pretiĝis kunlabore kun pluraj famaj esperantaj organizoj kaj certaj konataj fakuloj. RITE celas ebligi perfektigon pri instruado kaj edukigon pri kulturo kaj movadaj temoj ankaŭ al tiuj kolegoj, kiuj malfacile aŭ tute ne povas partopreni ĉeestajn kursojn aŭ renkontiĝojn. La kurso havas jam dekon da aliĝintoj el kiuj 5 kolegoj (el Belgio, Greklando, Nov-Kaledonio, Aŭstralio kaj Vjetnamio) kiuj komencis sian studon.</p> <p>La programo enhavas 100-lecionan kursaron kun studobjektoj : metodiko, gramatiko, literaturo, movadhistorio, frazeologio kaj liberaj temoj. La formado okazas rete. Ĉiu kandidato en sia propra ritmo elŝutas la lecionojn lineare progresante en la paralelaj temoj. Kondiĉo de antaŭeniro al la sekva leciono ene de unu temo estas trapaso de testo pri la studita materialo. Ene de metodiko al la 30-era teoria parto apartenas ankaŭ praktikaj taskoj kadre de kiuj la trejnado disvolviĝas laŭ la bezonoj de la kandidatoj sub individua gvidado.</p> <p>La kurso ne estas senpaga, sed ekzistas diversaj manieroj por plifaciligi la partoprenon.</p> <p><b>Kondiĉo por studi ĉe RITE estas:</b> minimume B2-nivela lingvokono pri Esperanto, ankaŭ retaliro. La kandidatoj post registriĝo trapasas intervuon antaŭ la komenco de la studoj, dum kiu ili ricevas helpon por ellabori personaligitan studprogramon.</p>
<p><b>L'ESPERANTO EN CHINE</b></p>	<p><b>ESPERANTO EN ĈINIO</b></p>
<p>La 14e Ecole Normale de Dandong (Liaoning, Chine), a été fondée en 1938. Elle a plus de 2 000 étudiants et 174 enseignants, dont 24 de niveau supérieur.</p> <p>Ayant entendu un rapport de Mme Li Yanqiu, enseignante de l'école, la vice présidente de l'association d'espéranto de Dandong et membre de ILEI (Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes), considérant le rôle important de l'espéranto, la direction décida d'introduire l'espéranto comme objet d'étude en 2e année.</p> <p>Le 31 mai 2011 le cours a enfin fonctionné dans une salle préparée avec attention : le drapeau vert, des tableaux sur l'espéranto, diffusion d'un chant en espéranto « Les jours joyeux ». 26 étudiants sont venus au cours de Mme Li. La direction se réjouit et souhaite que l'espéranto puisse jouer un rôle important, et pas seulement auprès des étudiants.</p>	<p>La 14-a Supera Mezlernejo de Dandongo, (Liaoningo, Ĉinio), fondiĝis en 1938. Ĝi havas pli ol 2 000 studentojn kaj 174 geinstruistojn, i.a. 24 altrangaj instruistoj. Aŭskultinte pri raporto de s-ino Li Yanqiu, de la lernejo, vic-prezidantino de Dandong-a kaj membro de ILEI (Internacia Ligo de Esperantista Instruistoj), kaj konsiderinte la aktivan rolon de Esperanto, la estraro decidis enkondukis Esperanton kiel studobjekton de la dua klaso.</p> <p>La 31-an de majo 2011 la kurso estis finfine funkciigita en zorgeme aranĝita klasĉambro: verda standardo, tabuloj pri Esperanto kaj disaŭdigo de la Esperanta kanto « la gajaj tagoj ». 26 studentoj venis al la kurso gvidita de s-ino Li. La estraro tre ĝojas kaj esperas, ke Esperanto povas vere ludi gravan rolon ne nur por la studentoj. Wu Guojiang</p>
<p><b>RIONS UN PEU</b></p>	<p><b>NI IOM RIDU</b></p>
<p>- Accusé, levez-vous ! Vous avez tué votre femme le lendemain de votre mariage. Qu'avez-vous à déclarer ? - Que la nuit porte conseil, Monsieur le Juge !</p>	<p>- Akuzato, stariĝu ! Vi mortigis vian edzinon la morgaŭon de via geeziĝo. Kion vi havas por deklari ? - Ke la nokto alportas konsilon, sinjoro Juĝisto !</p>





NOTRE PRESIDENT D'HONNEUR	NIA HONORPREZIDANTO
<p>Je suis allée début mars à Toulouse pour chanter avec la chorale Interkant', qui présentait son 6e concert : « Canto General » de Théodorakis sur des poèmes de Neruda traduits en espéranto.</p> <p>Bonne occasion de rencontrer Odette et Claude Gicquel (qui très jeune créa la « Verda Stelo-Esperanto 94 » et fut son président et animateur jusqu'à son départ pour la région de Toulouse, il y a quelques années). Ceux qui les ont connus apprécieront sans doute la photo prise à cette occasion.</p> <p style="text-align: right;">Tereza</p>	<p>Mi iris komence de marto al Tuluzo por kanti kun la koruso « Interkant', kiu prezentis sian 6an koncerton : « Kanto Ĝenerala » de Teodorakiso sur poemoj de Nerudo, tradukita en esperanto.</p> <p>Bona okazo por renkontiĝi kun Odette kaj Claude Gicquel (kiu kreis tute juna « La Verda Stelo-Esperanto 94 » kaj estis ĝia prezidanto kaj animanto ĝis sia translokiĝo al tuluza regiono, antaŭ kelkaj jaroj). Tiuj kiuj konis ilin certe aprezos la foton faritan tiuokaze.</p> <p style="text-align: right;">Tereza</p>



UNE TOUR DE BABEL DE LIVRES A BUENOS AIRES	BABELO TURO FARITA EL LIBROJ EN BONAERO
<p>La tour de Babel , gigantesque sculpture de 25 mètres de haut, faite de 30 000 livres des diverses langues du monde et créée par l'artiste Argentine Marta Minujin, a été inaugurée en mai sur la place Saint Martin de Buenos Aires. Cette masse de littérature est organisée en forme d'énorme spirale. Elle a été créée par cette plasticienne réputée à la suite du choix de Buenos Aires comme Capitale Mondiale du Livre 2011 par l'Unesco.</p> <p>Selon la Bible, les descendants de Noé ont construit une tour de cette hauteur afin d'atteindre le ciel. Leur prétention attira la colère de Dieu, qui les en punit par la confusion de leurs langues afin qu'ils ne puissent continuer la construction. Depuis les hommes parlent des langues différentes.</p> <p>Cette histoire biblique a inspiré l'artiste argentine Marta Minujin, qui a repris l'idée de la tour et des langues et grâce à son mirifique talent a imaginé une oeuvre représentant une Tour de Babel en livres.</p> <p>Pour la réalisation d'une tour de telle hauteur ont contribué des pays du monde entier par des livres de langues différentes.</p> <p><b>La langue internationale est aussi représentée dans cette oeuvre par cinq livres offerts par l'association espérantiste locale.</b></p>	<p>La Babela Turo, giganta skulptaĵo 25 metrojn alta farita per 30.000 diverslingvaj libroj el ĉiuj mondopartoj kaj kreita de la argentina artisto Marta Minujin, estis en majo inaŭgurita en la placo San Martín de Bonaero.</p> <p>La literatura maso estas aranĝita laŭ la formo de enorma spiralo kaj estis kreita de la famkonata plastika artistino okaze de la nomumo de Bonaero kiel Monda Libro-Ĉefurbo 2011-a fare de Unesko.</p> <p>Laŭ la biblio, la posteuloj de Noa konstruis altan turon. Ili strebis konstrui tiel altan turon, ke ĝi povu atingi la ĉielon. Per sia pretendo, ili kolerigis Dion, tial Li decidis puni ilin kaj konfuzis iliajn lingvojn por ke ili ne povu daŭrigi la konstruadon. De tiam la homoj parolas en diversaj lingvoj.</p> <p>De tiu ĉi biblia historio la argentina artistino Marta Minujin ricevis la inspiron kaj prenis la ideon pri turo kaj lingvoj, kaj per sia mirinda talento elpensis el ĝi urban artaĵon:</p> <p>la Babelan Turon el libroj.</p> <p>Por la realigo de tiel alta libra turo kontribuis landoj el la tuta mondo per diverslingvaj libro-donacoj.</p> <p><b>Ankaŭ la Internacia Lingvo Esperanto estas reprezentita en la artaĵo per kvin libroj, kiujn donacis la loka Esperanto-Asocio.</b></p>



UN TABLEAU LOGIQUE A DOUBLE ENTREE DES CORRELATIFS TRES AIDANT	
<p>tio, tia, tiu, tiam, tie, tiel, tial, tiom, ties. kio, kia, kiu, kiam, kie, kiel, kiom, kies. ĉio, ĉia, ĉiu, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉiom, ĉies. nenio, nenia, neniŭ, neniam, nenie, neniel, neniom, nenies. Essayez de traduire cette première colonne grâce aux informations suivantes (ex. tio = ça ; ĉiam = toujours ; kie= où)</p>	<p>« t » indique le démonstratif ; « k » l'interrogatif ; « ĉ » le collectif ; « nen » le négatif pour les débuts de mots ; et que « io » est la chose ; « ia », la qualité ; « iu », l'individualité ; « iam » le temps ; « ie », le lieu ; « iel » la manière ; iom la quantité ; « ies », l'appartenance.</p> <p style="text-align: right;"><b>REPONSE DANS LE PROCHAIN NUMERO</b></p>

RIONS UN PEU	NI IOM RIDU
<p>Un gendarme aperçoit un homme dans la rivière et lui crie : Baignade interdite ! Vous ne savez pas lire ? C'est défendu de nager ici ! Le baigneur gigotant et haletant réussit à lui répondre : Je ne nage pas ! Je me noie ! Bon, soupirez le gendarme : alors, faites vite !</p>	<p>Ĝendarmo ekvidas viron en la rivero kaj krias al li : Banado malpermesata ! Ĉu vi ne scias legi ? Estas malpermesite naĝi ĉi tie ! La bananto moviĝanta kaj senspira sukcesas respondi : Mi ne naĝas ! Mi dronas ! Bone, suspiras la ĝendarmo, do faru rapide !</p>

